Survoje al la malsanulejo mi demandis la instruistinon, kien ni iras. Ŝi respondis, ke ni iros al malsanulejo. Demandis mi, ĉu al Bispebjerg? “Jes, al Bispebjerg”. “Ĉu mi suferas pro cekuma inflamo?” demandis mi. “Sed kial vi tiel demandas?” demandis ŝi. “Ĉar mia onklo Johano iam iris al Bispebjerg pro tio”, respondis mi. “Mi vizitis lin, kaj li havis glason da akvo apud la lito”. La instruistino miris, ĉu mi estas psika!

Alveninte al Bispebjerg iu malsanuleja servisto diris al mi, ke li veturigos min en alian ĉambron, kie tre bonkoraj homoj plisanigos min. “Ĉu eble mi unue povas havi glason da akvo?” mi demandis. Li diris ke pli bone estas atendi ĝis post kiam la bonkoruloj estos vidintaj min.

Tiam mi vidis la bonkorulojn. Ili ĉiuj estis blanke vestitaj kun blankaj ĉapeloj, kaj kovris iliajn vizaĝojn blankaj maskoj. Anstataŭ trankviligi min, mi kredis, ke ili estas fantomoj. Sed ili parolis gepatrece al mi, kaj fine mi trankviliĝis. Oni tuj operaciis min, oni endormigis min per etero, malbonodora io, kio preskaŭ sufokigas onin. Mi vekiĝis en la mezo de la operacio, kaj mi ankoraŭ povas aŭdi la voĉon, kiu ordonis, “pli da etero, pli da etero!”

Mi vekiĝis en la plenkreskula sekcio de la malsanulejo, ĉar ne estis loko por mi aliie. Mi vomis kaj vomadis la tutan tagon, ĉar intertempe tagiĝis. Venis paĉjo por viziti min, li devis eliri el la ĉambro, ĉar la odoraĉo de la etero preskaŭ vomigis ankaŭ lin. Sed iom post iom mi fartis iom pli bone. Mia paĉjo klarigis al mi, ke mi suferis pro inflamita cekumo, kaj ke estis bone, ke mi venis, kiam mi venis, ĉar se mi estus veninta nur dek minutojn pli poste, mi estus mortinta. Sed ke nun ĉio estas en ordo.

*Daŭrigota*

*Bob Felby*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Woodstock estas mondfama kultura festivalo

Ĉu vi Klakis Ĉi tie.. Bona filma Informado. ? (3.37 minuta klarigo. Vidu! Ĝuu!)




Woodstock estas mondfama kultura festivalo, kie partoprenos pli ol 600 000 junuloj inter la 3-a kaj 5-a de aŭgusto 2017.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Karaj legantoj, bonvolu ekzerci viajn cerbojn kiel ni farisj



t.e. pensi, kredi, supozi, opinii, konsideri, elpensi, pensadi, pensi pri io / iu *Petro Danzer*

# Vespera Esperanto-kurso en Darvino.

Mi registris instrui vesperan Esperanto-kurson en Darvino. La kurso komenciĝos je la 10a de aŭgusto kaj daŭros 8 semajnojn, sed nur okazos se minimume 5 homoj aliĝos. Jen ligo:
http://www.adultnightclasses.com.au/365_Course_Enrolment/?p=Step1a&vscrty=Languages&vsday=&submit=1&show=show

Amike,
*Marc Schmidt* (Jonathon)





